



**RIO+20**  
Konferenco de  
Unuiĝintaj Nacioj  
pri daŭripova  
evoluo

**Nova ! (2012 majo 25) - Freŝaj informoj pri la Rio+20-agado de UEA :**  
<http://www.linguistic-rights.org/rio/>

### **Urĝa alvoko – subtenu la agadon de UEA en la Konferenco «Rio+20» !**

Sekve de la signifaj atingoj de UEA ( [http://bit.ly/UN\\_Bonn](http://bit.ly/UN_Bonn) ) en la [UN DPI NRO-konferenco en Bonn](#), 3-5 septembro 2011, nia granda tasko nun estas: sukcesigi la akcepton kaj traktadon de la rekomendoj ĵus alsenditaj por diskuto en [Rio+20](#), la granda konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri daŭripova evoluo, en Rio de Janeiro, Brazilo, meze de junio 2012.

Necesas agi *antaŭ la fino de majo*, ĉar ĝis tiam decidiĝos (per la voĉdonado), kiuj 10 (nur dek !) el la multegaj alsenditaj rekomendoj en ĉiu kategorio (temo) iros al la ‘finalo’ – kiam ankaŭ la granda publiko tutmonda (en retpaĝoj publikaj ne bezonantaj membriĝon por partopreni) aldonos siajn voĉojn.

La agado nun okazas en la retejo de RioDialogoj: <https://www.riodialogues.org/> La kunsido «Dialogo kun la civila socio», kiu traktos la rekomendojn, okazos inter la 16a kaj 19a de junio 2012, kadre de la Pintkunveno de la Tero, «Rio+20».


Nur tri (3) el la 10 ‘finalistoj’ de ĉiu temo estos prezentataj al la ŝtatestroj en altnivela kunsido de Rio+20.

#### **La praktikaj paŝoj por vi - NUN, antaŭ la fino de majo estas: voĉdoni laŭ la subaj detaloj.**

La enirpaĝo de la retejo RioDialogoj <https://www.riodialogues.org/login> legeblas en la angla, hispana, franca kaj portugala. Sed eblas alilingvigi ĝin (ekz. esperantigi) per la paĝsupre trovebla gugla tradukilo.

Por aliĝi al la retejo:

#### **1) petu invitan retmesaĝon tiel: sur la enirpaĝo...**



...iru al tiu parto :  
'Request Invite', 'Solicitar invitación', 'Invitation  
demandeuse' :) au 'Convite pedido', ktp.

## 2) Post ricevo de la enirebla retligo per retmesaĝo,

eniru la retejon (aliĝu al la dialogoj) uzante la enir-  
formularon de la tuj suba spaco:  
'Join the Dialogues', 'Únete a los Diálogos', 'Joignez-vous  
aux Dialogues', 'Junte-se aos diálogos', ktp.

## 3) Post sukcesa membriĝo kaj eniro,

vizitu la sube listigitajn retpaĝojn de niaj  
rekomendoj kaj subtenu ĉiujn kvar (4)  
proponojn en la diversaj kategorioj, klakante  
sur la vorton 'Support', kiu estas dekstre apud  
la titolo de la propono!

**Jen la subtenendaj proponoj – bonvolu klaki sur la vorton 'Support' por ĉiu kvar propono (ili estas en diversaj kategorioj). Nur unu klako necesas, 2a klako forprenas (nuligas) vian subtenon. Unu persono povas 'voĉdoni' nur unu foje por iu propono:**

"The importance of an international neutral language for promoting a global citizenship and a sustainable consumption/production" (kategorio: The economics of sustainable development )  
<https://www.riodialogues.org/node/231990>

"The importance of an international neutral language for preserving language diversity and biodiversity" (kategorio: Forests )  
<https://www.riodialogues.org/node/231978>

"Biocultural diversity for sustainable development - Intercultural Dialogue by multilingualism and by means of a neutral international language" (kategorio: Sustainable development for fighting poverty )  
<https://www.riodialogues.org/node/232007>

"The importance of an international neutral language for stimulating innovation" (kategorio: Sustainable cities and innovation )  
<https://www.riodialogues.org/node/231973>

Diskonugu tiun subteneblon ankaŭ al viaj ne-esperantistaj amikoj, kolegoj (reto , blogo, Facebook, Ipernity)!  
**Grandan dankon por via subteno per tiuj klakoj al Esperanto, lingvaj rajtoj, rajto je uzo de la gepatra lingvo, lingva kaj kultura diverseco!**

Stefano KELLER [Estrarano de UEA \(Eksteraj Rilatoj\)](#)